

Ernst Anschütz,

## Abio ho

*tradukita de Richard Schulz*

Abio, ho! Abio, ho!  
Vi estas tre fidela.  
Vi estas verda en somer',  
En vintro kaj en primaver'.  
Abio, ho! Abio, ho!  
Vi arbo tre fidela.

Abio, ho! Abio, ho!  
Vi multe al mi plachas!  
Vi estas ja Kristnaska ghoj',  
Vi arbo apud negha voj'!  
Abio, ho! Abio, ho!  
Vi multe al mi plachas!

Abio, ho! Abio, ho!  
Min vi verdul' instruas:  
Ke konstantec', ke la esper'  
Konsolas nin en la mizer'.  
Abio, ho! Abio, ho!  
Min vi verdul' instruas.

*Traduko de la Germana poemo "O Tannenbaum" de ERNST ANSCHÜTZ (\*1780-10-28 – †1861-12-18) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).*

*Arg-593-1193 (2013-02-26 15:10:12)*

*Tiu chi traduko aperis en 1982/12 en la n-ro 42 de la Vestfaliaj Flugfolioj eldonitaj de Rikardo Shulco (Richard Schulz). Tie estas indikitaj ankaŭ la muzik-notoj. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*

Ernst Anschütz,

## Abio vi

*tradukita de Paul Gottfried Christaller*

Abio vi, abio vi,  
kun foliar fidela!  
Vi verdas ne nur en somer',  
sed eĉ dum vintra neĝa ter'.<sup>2</sup>  
Abio vi, abio vi,  
kun foliar fidela!

Abio vi, abio vi,  
Al mi tre multe plaĉas.  
Ho, kiom ofte ĝojis mi  
en la kristnaska bril' be vi!  
Abio vi, abio vi,  
Al mi tre multe plaĉas.

Abio vi, abio vi,  
instruon donas bonan:  
Espero kaj la konstantec'  
konservas forton de junec'.  
Abio vi, abio vi,  
instruon donas bonan.

*Traduko de la Germana poemo "O Tannenbaum" de ERNST ANSCHÜTZ (\*1780-10-28 – †1861-12-18) en Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER (\*1860-08-21 – †1950-12-31).*

*Arg-593-1455 (2012-12-13 18:37:04)*

*Tiu ĉi esperantigo de la kanto troviĝas en la retejo [http://kantaro.ikso.net/das\\_deutsche\\_lied\\_in\\_esperanto](http://kantaro.ikso.net/das_deutsche_lied_in_esperanto) sub [http://kantaro.ikso.net/abio\\_vi](http://kantaro.ikso.net/abio_vi). Ĝi aperis unufoje en la kant-libro SSas e*

<sup>2</sup>aŭ:

sed eĉ dum vintra neĝ-veter'.

Tiun version de tiu ĉi linio mi, Manfred Retzlaff, iam aŭdis.